# BEKkurso PEPAS

dennis keefe, www.bekkurso.info

## 18-D Integrighaj Ekzercoj por 18-A, 18-B, kaj 18-C

Parolekzerco I 18-A, ( > 10 frazoj ) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Tiu estas Pablo. Li ne estas hejme. Li estas en la oficejo. Li ne trinkas. Li ne manghas. Li laboras. Ankauh Sinjoro Butako laboras. Li telefonas. Pablo ne telefonas. Li tajpas per komputilo. KTP.

Parolekzerco II 18-B, ( > 15 frazoj ) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Pauhlo kaj Maria ne estas hejme. Ili ne estas en la oficejo. Ili ne laboras. Ili ripozas. Ili estas che la marbordo. Pauhlo kushas sub la arbo. Maria estas en la maro. Shi naghas. Fishoj naghas kun shi. Estas kvar fishoj. KTP.

Parolekzerco III 18-B kaj 18-C, ( > 25 frazoj ) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Pauhlo kaj Maria ne estas hejme. Ili estas che la marbordo. KTP. Nun Pauho kaj Maria estas en la parko. Ili ne biciklas en la parko. Ili promenas tie. Li amas shin, kaj shi amas lin. Rikardo ne promenas en la parko. Li piediras al la laborejo. Li fumas. Sinjoro Nopo ne iras al la laborejo. Li ne iras tra la parko. Li iras hejmen. KTP

Diktajho I

Pablo ne estas hejme. Li estas en la oficejo, kaj li tajpas per komputilo.

Diktajho II

Pablo kaj Sinjoro Butako laboras en la oficejo, sed Pauhlo kaj Maria ripozas che la marbordo. Maria naghas kun la fishoj en la maro. Pauhlo kushas sub la arbo.

Prononcado

La alfabeto – a, b, c, ch, d, e, f, g, gh, h, hh, i, j, jh, k, l, m, n, o, p, r, s, sh, t, u, uh, v, z